

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

MAJO 1979  
67-A JARKOLEKTO

3

ISSN 0014-0694  
FONDITA EN 1913

## Bonvenon, ASE

La 14an de marto ĉijare fondiĝis Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Unu semajnon pli poste la iom oficiala gazeto *Moscow News* — *Novaĵoj de Moskvo* donis informon pri tio — en esperanto. Jam por la kvara aŭ kvina fojo la cetera anglalingva semajna gazeto havis plurpaĝan aldonon en esperanto. Tiun ĉi fojon la aldonajo temis, krom pri parolado de Leonid Breĵnev ankaŭ pri la fondo de ASE.

La fonda konferenco de ASE ĉeestis 101 delegitoj kun voĉdona rajto. El la nombro de la delegitoj 27 estis malpli ol 30-jaraĝaj.

La konferencdelegitoj reprezentis pli ol 4000 esperantistojn, membrigitajn en kluboj. Ili venis de 10 uniaj respublikoj de USSR, unu aŭtonoma respubliko, 19 teritorioj kaj regionoj.

Temas do pri tutlanda organizaĵo. Prezidanto fariĝis prof. dro Mahomet Isajev.

La fondiĝo de ASE signifas oficialiĝon de la esperantomovado en Sovetunio. La fondiĝon antaŭis oficiala decido de la 27a de decembro 1978.

Post multaj jaroj ankaŭ unu el la plej grandaj ŝtatoj de la mondo ree havas organizitan esperantomovadon. Tio ĉi estas sendube grandega paŝo antaŭen de la tutmonda movado.

Kiam ni skribas *Bonvenon, ASE!* ni ne bonvenigas nur la novan organizaĵon, sed ankaŭ ĉiujn milojn da esperantistoj en lando, kiu ĉiam estis unu el la plej gravaj en la historio de la esperantomovado.

Ni atendas, ke ASE baldaŭ membriĝu ankaŭ en la internacia movado.



## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet  
Adress: Box 4009,  
122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare:

Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin,

Myggdalsvägen 123,

135 42 Tyresö

Telefon hem: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven

Alexandersson, Åke

Blomberg, Anita Lindblom,

Geoffrey Sutton

Prenumeration: 40 kronor

per år, postgiro 20 12 - 3,

Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med

8 nummer per år: i februari,

mars, april, maj, september,

oktober, november och

december

Manusstopp: den 10, måna-

den före utgivningsmånaden

Fotosats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet AB,

Stockholm 1979

## Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,

122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägerv. 31,

(T-station Tallkrogen)

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har

öppet tisdagar kl. 18 — 20

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift: direkt-

ansluten medlem 50 kronor,

ungdomsmedlem under 26 år

25 kronor, familjemedlem

utan tidning 15 kronor

Prenumerationsavgift för *La*

*Espero* och *Esperanton* nytt

ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får

dessutom ungdomsförbundet

SEJUs blad *ktp*.

## Esperantoförlaget

Postadress: Fack,

200 42 Malmö

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B

Öppetider: 1 sept — 15 maj:

onsdagar kl. 10 — 11,

torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar

expedieras hela året, även

under sommaren

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition:

Anna-Greta Strönne

Medhjälpare: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande:

Åke Blomberg

# JES & ONE

# VIKTIGT!

I samarbete med studieförbundet Medborgarskolan arrangerar SEF nu en ny kurs för cirkeledare i esperanto.

Kursen äger rum i september, den 28, 29 och 30, i Karlskoga Folkhögskola, som ligger vackert med utsikt över sjön Möckeln.

Kursens huvudvikt kommer att läggas på undervisningsmetodik och vuxenpedagogik, men

även undervisning i esperanto med en erfaren lärare kan inplaneras. Använd den bifogade anmälningsblanketten för din anmälan, men också för att uttrycka dina önskemål om en sådan kurs.

Kursavgiften är 100 kronor per deltagare. För detta låga pris får du två övernattningsdubbelrum och måltider.

Men det finns ett men: delta-

garantalet övernattande gäster är maximerat till 30.

Deltagarförteckning och ett detaljerat program kommer att utsändas efter sommaren.

Anmälan, som är bindande, ska insändas snarast, dock senast den 15 juni till

Kerstin Rohdin  
Ålsta  
690 72 Sköllersta

## Pasporta servopor via uzo

Kontaktu aliajn esperantistojn!  
Uzu la **Pasportan servon!**

La novaj broŝuroj de Pasporta servopor 1979 estas pretaj kun 320 adresoj de gastigantoj en 44 landoj. Ĉiuj rajtas uzi tiun unikantan servon kaj senpage tranokti en amika etoso.

Mendu tiun broŝuron pagante 16,55 kr al pĝ 91418-4 de Willem Posthuma. Per tio vi ankaŭ farigas membro de Pasporta Servo.

## Unua ĉijara listo pri Klubo Cent

*Klubo Cent* nådde under 1978 nästan till 100 «medlemmar». Hur många blir det i år? Här nedan kommer listan på de som kommit med under första kvartalet i år:

Göta Nordlander, Kramfors  
Åke Waller, Umeå  
Torsten Irdevall, Åmneberg  
Nils Johansson, Norrköping  
Alice Johansson, Norrköping  
Åke Florbäck, Bromma  
Jan-Olof Svensson, Tidaholm  
Herbert Rosendahl, Vänersborg  
Valfrid Sandén, Bromma  
Jim Hornö, Göteborg  
Ljungby Esperantoklubb  
Hj. Örtenblad, Ljungaverk  
Linnea Edsenius, Nybro  
Erik Carlén, Kumla  
Barbro Karlsson, Lysekil  
Erik Swärd, Malmö  
Curt Olsson, Uddebo  
Henry Almar, Uddevalla

Karin Sehlstedt, Johanneshov  
Ebba Dahlberg, Örebro  
Britt Svensson, Karlstad  
Ragnar Hjorth, Stockholm

Tack för hjälpen till er alla!

Reglerna för att komma med i denna «klubb» är i år desamma som i fjol: man betalar 100 kronor till postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet, och anger *Klubo Cent* på talongen.

## Ni sentas ilian perdon

La 16an de februaro la Esperanto-klubo de Umeå post nur kelktaga malsano perdis sian

sekretarion, **Harald Pettersson**, en aĝo de 67 jaroj

Unu el la plej malnovaj esperantistoj de Jönköping, **Märta Jensie**, subite forpasis la 25an de marto. Ŝi lernis esperanton jam en la tridekaj jaroj kaj restis fidela al ĝi. En la kluba laboro kaj kiel UEA-delegito ŝi faris multan servon al nia movado.

En Arboga forpasis **Hjalmar Andersson**, pura idealisto kaj unu el la plej fidelaj membroj. Li verkis en esperanto kaj liaj noveloj publikigis en *Literatura Mondo*.

Ni sentas ilian perdon kaj kore kondolencas al la familianoj.

# Luzern?

15 juni är sista dagen, när du kan anmäla dig till Luzern till nedanstående priser. Gör slag i saken idag!

1. Icke medlem i UEA	440 skr
2. Medlem med årsbok	400 skr
3. Medlem med årsbok och 'esperanto'	325 skr
4. Make/maka till (1)	310 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	290 skr
6. Ungdom t o m 20 år	140 skr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	220 skr
8. Synskadad	170 skr

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel 040-6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

## Socie satira libro el antaŭa jarcento

### EREVONO

Utopia satira romano de Samuel Butler. Tradukita el la angla kaj eldonita de Alec Venturere. (Unua eldono 1863).

Mi ne komprenas, kial oni nomis la libron romano. Sed socie satira ĝi estas simile al la vojaĝoj de Gulivero. Aventurema viro esploras nekonatan regionon por trovi prosperon, trapasante sovaĝan arbaron kaj rokaron. Li trovas landon, kie la plej strangaj kutimoj regas.

Malsano estas krimo, sed ŝteliston kaj trompiston oni kompatas. Ĉiujn pli komplikajn maŝinojn oni jam delonge detruis, kaj estas krimo, ekzemple, posedi horloĝon. Preskaŭ la tuta rakonto estas pli rezonado ol agado. La personeco de la agantoj ne estas klare rivelata.

Pri la traduko mi rimarkis la tendencon uzi *tial ke* anstataŭ *ĉar*, kaj la modvorton *ties* anstataŭ *lia, liaj, ĝia, ĝiaj* ktp. Eraro estas «li mem kulpis tion» (p. 109). La romano estas ne tre interesa. Preso kaj bindo bonkvalitaj.

Salex

## FÖRENTA NATIONERNA

# FN-kommissioner om följderna av nya språk

I *La Espero* 2/79 lovade vi en en översättning ur *UN kaj ni*, gjord av Karl Gustafsson. Här kommer den i en något förkortad version.

### FN-KOMMISSION HAR DEBATTERAT FÖLJDerna AV TILLÄGGSSPRÅK

I nr 8 av *FN och vi* och de efterföljande numren 9 och 11 har vi berört FN-dokumentet «Rapport om följderna av tilläggspråk i FN-systemet»

Sedan dess har denna rapport undersökts av två FN-kommissioner, nämligen kommissionen för administrativ kontroll och av rådgivande kommissionen för administrations- och budgetfrågor.

Femte kommissionen, en av generalförsamlingens huvudkommissioner, som sysslar med administration och budget, har inlett en debatt om rapporten från FN-familjens gemensamma inspektionsgrupp.

I denna debatt inleddes rapporten av inspektionsgruppen, som nämnde följande punkter såsom möjligheter att reducera kostnaderna för språklig service:

(1) Skapa ett centralförråd av översättare, som skulle användas av alla FN-organisationer och vars största «kund» skulle vara FN.

(2) Inrätta ett slags tryckericentral för utgivning av utgåvor för Västeuropa, att förläggas till Wien och att ta under övervägande möjligheten att bredda det nu existerande arrangemanget för tryckning och

översättning av utgåvor från de olika staternas sida.

(3) Språkliga tjänster skulle tas i anspråk endast i särskilt utvalda, ooundgängliga fall. Organisationer inom FN-familjen, som ännu inte gjort det, borde utreda sitt behov av service i syfte att införa en längre gående «selektivism» [som inte är något annat än diskriminering — Red]

(4) Ständigt söka utveckla tekniska lösningar, i synnerhet överföring av facsimil — via kabel eller radiokanaler — av dokument för översättning på översättarcentralen.

(5) Regeringar bör överväga att etablera nationella eller regionala centraler, där man kan skapa fram kompetenta översättare och tolkar.

I en kommentar av rapporten från inspektionsgruppen anser den administrativa kontrollkommissionen, att man bör koncentrera ansträngningarna huvudsakligen till skriftliga översättningar, för vilka 80% av kostnaderna för språktjänster används och att man skall vara mera flexibel när det gäller muntlig översättning. Inspektionsgruppens rapport har inte heller tillräckligt accentuerat den viktiga kostnad, som kommer till när antalet språk överstiger kapaciteten hos de existerande installationerna.

Administrations- och budgetkommissionen anser, att inte bara tekniska och finansiella, utan även politiska hänsyn tränger igenom i beslutet, om ett nytt språk skall införas.

I varje fall ser dessa kommissioner ingen annan utväg än samsamhet med tjänster.

# HODIAŬ



## Nura idealismo ne plu estas sufiĉa

*Kiom longe idealisma movado povas resti pure idealisma kaj tamen progresi?*

*Tiun demandon ni povas starigi al ni pli kaj pli ofte. Mi kredas, ke en la fakto, ke ni estas pure idealisma movado kuŝas parto de nia maleblo grandskale kreskigi la nombron de niaj membroj, ampleksigi nian agadon kaj akiri oficialan apogon.*

*Ne estas erare labori idealisme — tute kontraŭe! Sed ne sufiĉas nur labori idealisme. Kiam la tuta socio funkcias per spertuloj, dungitoj, homoj, kiuj dediĉas sian aktivan labortempon al io (komerco, produktado, servado, idealismaj servoj), estas malfacile atingi ion, se oni ne mem agas en simila maniero.*

*De pluraj flankoj oni aŭdas proponojn, ke SEF havigu vojaĝsekretarion, aŭ sindikon, aŭ alian dungiton, kiu faru ion aŭ alian. Tio estas pravaj postuloj, sed kiel tiu aŭ tiuj dungitoj ricevu sian salajron? Ĉu niaj membroj pretas financigi la kosojn ligitajn al dungo? Ĉar ne sufiĉus duobligi la nunan membrokotizon por atingi tion, sed kvar- aŭ kvinobligi!*

*Tion ni kompreneble ne povas fari. Tial gravas, ke ni serioze pridiskutu vojojn, kiel akiri monon por dungi iun aŭ, prefere, iujn.*

*SEF funkcias dank'al volontuloj kaj ilia preteco servi la asocion. Sen ilia servo nenio estus atingita. Sed por plievoluigo volontula servo ne estas sufiĉa. Por tio oni bezonas iujn, kiuj plentempe dediĉas sin al la asocia laboro.*

*Ni troviĝas en dilemo, sed samtempe ankaŭ ĉe ia turniĝo, kiu tutsimple devigos nin iel ŝanĝi nian laboron. Ni havas kelkajn rimedojn, kiuj povus ebligi kelkajn komercajn agadojn, kiuj enspezigu ion al la sveda movado. Ekzemploj el aliaj landoj montras, ke tio eblas (UEA, Bulgara Esperanto-Kooperativo, Brita Esperanto-Asocio).*

*Postuli, ke nur volontuloj jaron post jaro plutrenu la movadan ĉaron, fariĝas pli kaj pli malfacila.*

Franko Luin

# La plej kutimaj birdoj temo de nia leciono

Antaŭ unu jaro ĈIUTAGA ESPERANTO temis pri printempaj floroj. Ĉar denove estas printempo, ni pritraktu temon printempecan: birdojn, sed ne nur tiujn, kiuj alvenas printempe, sed birdojn ĝenerale, kun la sola limigo ke temu pri birdoj ĝenerale videblaj kaj rekoneblaj.

En lagoj kaj ĉe fluantaj akvoj la birdaro kutimas esti sufiĉe abunda. Videblas tie **tufgreboj** (*skäggdopping*), similaj laŭ grandeco al **platbekaj anasoj** (*gräsand*), sed malsamaj laŭ aspekto. Plej karakteriza por tufgrebo estas la tufo sur la kapo kaj iaspeca barbo. La dorso estas brunnigra, la ventro tute blanka. La platbeka anaso rekoneblas pro la malhele verda kapo kaj blanka kolringo.

**Griza ardeo** (*häger*) estas longkrura kaj longkola birdo kun blugriza dorso. Ĝi povas

Rabobirdoj ne abundas, speciale ne la plej grandaj el ili, ekzemple la **aglo** (*örn*). Sed kelkaj estas tiom oftaj, ke oni povas riski vidi ilin. Unu el ili estas **buteo** (*ormvråk*), malhele bruna birdo, loĝanta en arbaroj tra la tuta lando. Ĝi vivtenas sin per musoj, ranoj, serpentoj kaj simile.

**Nizo** (*sparvhök*) estas multe pli malgranda kaj nutras sin ĉefe per etbirdoj. Ankaŭ ĝi prefe-

muškaptulo



najtingalo



ringokolombo



verda pego




granda paruo



kampalaŭdo



vanelo



ras arbarajn regionojn.

La plej kolorriĉa birdo de Svedio estas **fazano** (*fasan*), origine importita el Azio. Plej facile ĝi rekoneblas pro la longa vosto.

**Vanelo** (*tofsvipa*) estas trovebla sur kampoj kaj herbejoj. Blanka kaj nigra laŭ koloro, ĝi estas rekonebla pro mallarĝa tufo sur la kapo.

**Skolopo** (*morkulla*) estas granda kiel kolombo, sed kun longa beko kaj «terkolora» (griza, nigra kaj bruna, makuleta). Ĝi ofte nestas en truo sub juna piceo; ĝi vivtenas sin per insektoj kaj vermoj.

**Blankventra tringo** (*drillsnäppa*) ne estas pli granda ol turdo. Ĝi troveblas sur arbaraj lagobordoj, kie ĝi kaptas kulojn kaj aliajn insektojn.

Bonaj flugantoj estas **griza mevo** (*fiskmås*) kaj **ridmevo** (*skratmås*), la dua iom pli

malgranda ol la unua. Ambaŭ troviĝas kaj ĉe la marbordo kaj ĉe lagoj. Ridmevon oni facile rekonas pro la preskaŭ nigra kapo.

Du kolomboj estas troveblaj en la svedaj arbaroj: **trukolombo** (*skogsduva*) kaj **ringokolombo** (*ringduva*). La unua estas blugriza laŭ koloro, iom pli malgranda ol ringokolombo, kiu ankaŭ estas rekonebla pro blanka makulo ĉirkaŭ la kolo.

**Kukolo** (*gök*) estas pli konata pro sia kanto ol pro aspekto. Ĝi estas blugriza sur la dorso kaj flugiloj, kun hela striita ventro. Troveblas en arbaroj, ne tro densaj.

Grizbruna, 40 cm granda estas **arbara strigo** (*kattuggla*), kiu vivtenas sin per musoj, sed ne rifuzas ion ajn alian: etajn birdojn, limakojn, ranojn, insektojn.

**Apuso** ĵus ricevis novan svedan nomon: *tornseglare* anstataŭ la ĝisnuna *tornsvala*, kiu erare kredigis ĝin esti hirundo, eble pro simila vosto. Plej ofte ĝi troveblas meze inter la homoj (iom super ili, tamen).

**Verda pego** (*gröngöling*) diferencas de la parenca **granda buntpego** (*större hackspett*) pro la ĉefe verda koloro de sia plu-

tere.

Unu hirundo ne alportas printempon, oni diras, sed alveno de **kamphirundo** (*ladusvala*) kaj **murhirundo** (*hussvala*) koincidas kun la laveno de printempo. Kamphirundo estas la hirundo kun la plej dividita vosto. Ambaŭ vivtenas sin per insektoj.

La korvo-familio havas plurajn reprezentantojn en Svedio: **korniko** (*kråka*), grizbruna, **frugilego** (*råka*), «metale» nigra, **monedo** (*kaja*), nigra kun griza nuko, kaj **pigo** (*skata*), blanknigra, longvosta.

**Nuksrompulo** (*nötkråka*) kaj **garolo** (*nötskrika*) estas multe pli helaj ol la ceteraj korvobirdoj, la ĉilasta eĉ iom ruĝeta. Ambaŭ loĝas en arbaroj. Garolo estas lerta imitanto de kantoj

de aliaj birdoj kaj povas trompi eĉ plej lertajn ornitologojn.

**Granda paruo** (*talgoxe*) oftas en la ĝardenoj, precipe vintre kaj kune kun sia blueca parenco **blua paruo** (*blåmes*), pli malgranda, sed pli batalema.

**Foliarparuo** (*entita*) tre similas laŭ aspekto al la aliaj paruoj, sed ĝia dorso estas bruneta griza. Preferas iom malsekajn regionojn.

Se vi vidas birdon, kiu malgrimpas sur arbo kun la kapo suben, tio estas **sito** (*nöiväcka*), la sola birdo, kiu kapablas tion. Vi povas rekonigi ĝin ankaŭ pro la tre mallonga vosto kaj iom pinta profilo de la kapo.

Alia arbogrimpulo, sed supren, estas **certio** (*trädkrypare*). Ĝi komencas esplori la arbon ĉe la radikoj kaj grimpas laŭ ĝi ĝis la pinto, tre sisteme.

**Griza turdo** (*björkrast*) ne famas pro bela kanto, kiel ek-

atingi preskaŭ metron da alto kiam ĝi rektiĝas.

**Molanaso** (*ejder*) estas la plej granda el la anasoj. Ĝi troviĝas ĉe la marbordo kaj en la ŝeraro. La birdo estas blanka ventre kun nigra dorso (validas por la virbirdo).

**Muta cigno** (*knölsvan*) estas karakteriza en lagoj, riveroj kaj kanaloj, tute blanka birdo, longkola, kun ruĝa beko.

zemple ĝia parenco **merlo** (*koltrast*), kun tute nigra plumaro kaj flava beko. Merlo ŝatas sidi alte, kiam ĝi kantas. Ĝia kanto estas melodia kaj klara.

Ankaŭ la sekvanta grupo de birdoj famas pro sia kanto: **najtingalo** (*näktergal*), granda kiel pasero, sed kun forta melodia kanto, aŭdebla je vesperiĝo; **rubekolo** (*rödhake*), kies ruĝa gorĝo donis al ĝi la nomon, videbla sur la pinto de alta piceo, kiam ĝi kantas klare; **flava hipolao** (*hårmsångare*), verdgriza, kun tre varia kanto, en kiun ĝi enmetis erojn el kantoj de aliaj birdoj; **nigraĉapa silvio** (*svart-hätta*) kun karakteriza nigra «ĉapo» kaj flutsimila tre varia kanto kaj la similsona **ĝarden-silvio** (*trädgårdssångare*), sed sen ia karakterizaĵo; **blankgorĝa silvio** (*törnsångare*), trovebla en arbustaro, kun pli mallongaj strofoj en sia kanto ol la antaŭaj du birdoj; **babilema silvio** (*ärrsångare*), kies kanto similas al jetado de sekaj pizoj en skatolon, kiel iu priskribis tion; **fitiso** (*lövsångare*), la plej ofta birdo en Svedio, sen ia karakteriza trajto, sed kun ĉarma melodia kanto.

Griza kaj **blanknigra muŝkaptulo** (*grå och svartvit flug-*

**Bombicilo** (*sidensvans*) kutimas aŭtune invadi nian ĝardenon kaj en unu tago formanĝi ĉiujn berojn de la arbustoj. Iom malpli granda ol sturno, ĝi belas pro sia ruĝgriza plumaro, mola kiel silko.

**Sturno** (*stare*) kutimas vivi are kaj are ili migras. Ili troveblas preskaŭ ĉie. Laŭspekte ili estas metale nigraj printempe.

**Verda fringo** (*grönfink*) videblas ofte en parkoj, sed ankaŭ en malalta arbaro. Plej kutima manĝaĵo estas semoj kaj beroj.

**Kanabeno** (*hämpling*) estas buntkolora, kun ruĝa brusto kaj frunto. Loĝas en malferma pejzaĝo kaj larĝareaj ĝardenoj.

Ruĝan bruston havas ankaŭ **pirolo** (*domherre*), kiu ofte videblas apud konstruaĵoj dum la

motacilo



dompasero



rubekolo



fazano



*snappare*) kaptas muŝojn kaj aliajn flugantajn insektojn, laŭdire tre efike. Ili kutimas sidi sur branĉo, de kie ili subite ekflugas, kaptas preterflugantan insekton kaj residiĝas, ofte sur saman branĉon.

Pri insektoj interesigas ankaŭ **motacilo** (*sädesärta*), nigra-blanka-griza birdo kun longa vosto. La insektojn ĝi kaptas de la grundo, kie ĝi plej kutime estas.

vintro. Somere ĝi estas en picea arbaro, kie ĝi vivtenas sin per semoj, beroj kaj burĝonoj.

Ruĝecan bruston havas ankaŭ **fringo** (*bofink*), kiu travintras pli sude, sed revenas malfruvintre al niaj regionoj. Apartenas al la birdoj, kiujn oni rimarkas kiel anoncantoj de la venanta printempo.

Simila al fringo laŭ la grandeco estas **flava emberizo** (*gulsparv*), kun klare flava kapo kaj brusto. En sia kanto ĝi nombras ĝis sep, kiel oni instruis al mi.

Ni finu tiun ĉi rapidan trarigardon de birdnomoj per du tre similaj kaj konataj birdoj: **dompasero** (*gråsparv*) kaj **kampopasero** (*pilfink*), la unua kun griza kapo, la dua kun bruna, ambaŭ brunaj cetero. La dompasero troviĝas nur apud la homaj loĝlokoj, dum la kampopasero ne tiom estas ligita al homo.

Franko Luin

— RECENZO —

## Kolorplena vortaro Aĉetu ĝin tuj!

Ĉu vi ŝatas la serion *Ĉiutaga esperanto en La Espero*? Do vi ankaŭ ŝatos la libron *Praktika bildvortaro de esperanto*, kiu ĵus aperis en Britio.

La libro havas ian rilaton al la serio de *La Espero*, ĉar ĝi prezentas ĉiutagajn vortojn sur plej diversaj kampoj — kaj tio montriĝis manki en esperanto. Per tiu libro oni ricevis grandan helpilon. Sed ĝi ankaŭ malsimilas al la serio, ĉar ĝi nur listigas vortojn pri objektoj aŭ konceptoj ilustritaj sur la sama paĝo.

La ilustraĵoj — 75 entute — estas tutkoloraj kaj sufiĉe detalecaj, sed kompreneble ne ĉiuj detaloj povas troviĝi sur ili.

Sed ni rigardu prefere kio troviĝas en la libro. Ĝi komenciĝas per la universo, daŭrigas per la vortoj utilaj kiam ni parolas pri la mondo kaj transiras al la homa korpo. Kvar preskaŭ tutaĝaj ilustraĵoj prezentas la vortojn pri vestaĵoj. Aro da paĝoj prezentas objektojn troveblajn en plej diversaj medioj: hejme, en la urbo, en la laborejoj, en lernejo, en vendejo ktp. Aliaj paĝoj temas pri sportoj, pri la naturo, bestaro kaj floro, veturiloj, satokupoj.

Oni provas ankaŭ ilustri pri abstraktajn aferoj, kiel ekzemple verbojn kaj komparojn, ne same sukcese.

La libro estas produktita en



Britio kaj ekzistas simila anglalingva libro, pro tio troviĝas kelkaj anglaj vortoj en la ilustraĵoj (ekzemple sur ŝildoj en la urbo). Tio ne ĝenis min, sed eble iun alian jes.

Pro sia preskaŭ unika karaktero inter la esperantaj vortaroj kaj pro sia utileco mi trovas la libron senrezerve rekomendinda: por kursoj, kiel kompletigo al la ekzistantaj lernolibroj kaj vortaroj, kaj por la pli lertaj esperantistoj, kies vortrezoro rilata al ĉiutagaj objektoj kaj esprimoj estas iom malgranda. Aĉetu ĝin tuj!

Franko Luin

# NYHETER

**PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO**  
utgiven av Oxford University Press. 2000 ord på esperanto, illustrerade med färgbilder. 96 sidor, häftad. Se recension i detta nummer av *La Espero*.  
Pris 44,50

**ĈU LI BREMSIS SUFIĈE?**  
originalroman i deckargenren av Johan Valano. Polis-detektiven från *Ĉu vi kuiras ĉine?* fortsätter lösa spännande mordgåtor. 128 sidor.  
Pris 35,—

**LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO**  
av John Wells, utgiven av UEA CED. Modern vetenskaplig presentation av esperantos fonetik, syntax, morfologi mm. 76 sidor.  
Pris 34,—

**LA PERDITA HONORO DE IU**  
**KATERINO BLUM**  
av nobelpristagaren Heinrich Böll, översättning av R. Sulco. Protestroman mot journalistiskt sensationskrivande. 154 sidor.  
Pris 48,—

*Moms inräknad i priserna*  
**ESPERANTOFÖRLAGET**  
Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578-5

## Esperantoförlaget visar ett bättre resultat

Förlagsföreningen Esperantos bokslut för år 1978 redovisar en glädjande ökning av försäljningen. Omsättningen har ökat från 35 Tkr till 47 Tkr, en ökning med 36%.

Resultatet har också förbättrats, men eftersom försäljningen huvudsakligen utgöres av förmedling, till största delen av utländska böcker, är det fortfarande otillfredsställande. Före avskrivningar hade vi en vinst på ca 6 950 kr, men det beloppet räcker inte till planerliga avskrivningar på vår fotosättningsanläggning. Och det borde det ha gjort, för anläggningen, på vilken den nya ordboken sattes, förslits ganska snabbt.

Förlagets största problem är kapitalbristen. Vi har visserligen ett visst kapital, men det består av medel som har insamlats för den nya ordboken. En del av detta kapital har riskerats på utgivningen av *Aniara*, och en del kommer att satsas på en ny läsebok, som kommer ut i höst. *Aniara* föreligger nu äntligen efter många sorger och bedrävelser färdig.

Manuskriptet, en förnämlig översättning av Bertil Nilsson och William Auld, var färdig och till och med satt för flera år sedan (1975). Övåntade hinder mötte när det gällde att förvärva utgivningstillstånd. Det har senare visat sig att Harry Martinson själv — som så många andra felinformerad om esperanto — var skeptisk till översättningen. Han trodde att hans mästerverk skulle förvänskas om det skulle utges på ett språk som han inte trodde kunde återge alla fina nyanser i hans eget språk. Han vägrade aldrig utgivningstillstånd, men han medverkade heller inte till ett juridiskt klart och hållbart tillstånd.

Efter Harry Martinsons död fick vi äntligen utgivningstillståndet, tack vare personlig kontakt med hans förläggare och vän Georg Svensson hos Bonniers, som visat oss stor förståelse. Episoden leder till eftertanke: varför når vi inte ut med vår information om vad esperanto egentligen är?

Men vi har flera goda förslag till utgivningar, bl a en barnbok, *Vi bor i samma hus*, vars svenska upplagan är utgiven av Svenska FN-förbundet. Det vore en utmärkt utgåva det år som FN

proklamerat som Barnets år. Men vi tvekar att satsa ytterligare ca 15 000 kr av «ordbokskapitalet», så vi har tyvärr måst säga nej.

Förlaget har från 1979 övertagit marknadsföringen i Sverige av *Semajno de Internacia Amikeco*. Av tekniska skäl blev *La Esperos* första nummer för 79 starkt försenat, så den kampanj vi tänkt oss blev inte av. Men inför 1980 kommer vi att vara ute i god tid för att intensifiera intresset för SIA.

Årsstämma blir i Kungälv i samband med SEFs årskongress.

Åke Blomberg

— SEJU —

## Per ludoj kaj kantoj kunvenas la junularo

En luita feriloĝejo en Rösjö apud Sollentuna SEJU okazigis kunvenon de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo. Ĉeestis dek ok junaj esperantistoj, kaj novuloj kaj lertuloj, kiuj dum la tagoj kantis, kuiris, purigis mangilojn, kurse lernis esperanton kaj ludis.

Ludis? Jes, ni ludis preskaŭ ĉiel. Ĉeestis ludema upsalano, kiu igis akordionon elspruci belajn melodiojn, kaj flutistaro el Kiruna, kiu produktis mezepokajojn, barokajojn, popolajojn kaj modernajojn, ludante flutegojn, flutetojn kaj kurbokornojn. Ni ankaŭ ludis pantomime kaj desegne.

Ni plurhore sidis ĉe tabloj, ludante «vorto-mozaikon». Tio estas japana kartludaro, sur kies karto aperas po unu litero. La literojn oni kunigu al vortoj. La ludo estas tre ĝojiga afero. Oni senlace ludas dum horoj, lernante multajn novajn vortojn. Ĝi estas rekomendinda por kursoj.

Ni kursis en du niveloj. Ĉiuj estis tre lernemaj kaj studis lerte. Verdire la tuta kunveno estis kurso, ĉar ni tre multe parolis esperanton en tagaj situacioj, ĉe la tablo, je kuirado, je purigado kaj je aliaj okazoj. Uzi esperanton en la taga vivo dum kelkaj tagoj eble estas la plej bona

## Karl Söderberg kulturstipendiat

Karl Söderberg har tilldelats Arbetarrörelsens kulturstipendium i Uppsala för sina insatser inom teater, konst, musik och på flera andra kulturområden under många år.

I Arbetarekommunens och LO-distriktets motivering heter det bl a: «Karl Söderberg personifierar den breda kultursyn arbetarrörelsen företräder. Han har sedan unga år verkat inom folkbildningen och lagt ner ett oegennyttigt arbete för att ge de många i samhället möjlighet till kulturupplevelser.»

«Jag är föreningsmänniska från barndomen, och mitt kulturintresse har jag haft ända

sedan uppväxtåren i ett arbetarhem i Dalarna», säger han.

Karl Söderberg kom till Uppsala 1925 och har sedan dess varit starkt engagerad i det uppsaliensiska kultur- och föreningslivet.

Efter tio år som pensionär är han i dag lika aktiv som någonsin och ordförande i Uppsala läns ABF-distrikts kulturråd, v ordf i Stadsteaterns styrelse och ordf i Uppsala läns distrikt av Pensionärernas Riksorganisation, bl a.

I Stadsteaterns styrelse har han suttit sedan starten 1951, tidigare som ordförande, och i sin egenskap av ordförande i kommunens konstråd var det han som tog initiativet till Sven X-et Erixons fresk i teaterns entré.

Under ett 20-tal år var Karl Söderberg också ordf i Uppsala Konstförening. Föreningen hade, innan den flyttade till Gamla Gillet, sina lokaler i Stadsbiblioteket, och i biblioteksstyrelsen innehade Karl Söderberg ordförandeposten i 25 år från 1939, två år innan det nu urvuxna biblioteket byggdes.

Från 1958 och fram till pensioneringen 1969 var Karl Söderberg skoldirektör i Uppsala och dessförinnan skolinspektör och rektor för folkskolan. I tjänsten startade han, på initiativ från dåvarande director musices Sven E Svensson, «Folkskolans frivilliga musikundervisning», eller det som i dag är Kommunala musikskolan.

Karl Söderberg var också en av initiativtagarna till Konstfrämjandet i Uppsala län, vars ordförande han var från starten 1972 till 1976.

När han nu tilldelas Arbetarrörelsens kulturstipendium är det också för sina insatser i nordiska och internationella sammanhang. Han har under flera år varit styrelseledamot i Föreningen Norden, där han bl a arbetat med skolungdomsutbytet, och är ledamot av Esperantoakademien.

«Mitt intresse för esperanto har jag haft sedan jag för 20 år sedan lärde mig språket. Behovet av ett internationellt språk tror jag på. Om det sedan är esperanto eller något annat är oviktigt, men för dagen är det enda alternativet», säger han.

Enligt Uppsala Nya Tidning



Jan-Olof Svensson estas la nova prezidanto de SEJU. Sekretario estas Jan Setréus. Tri membroj de la estraro loĝas en Kiruna, i a la kasisto Per Eje-klint kaj la redaktoro de ktp, Leif Gunnar Karlsson.

# Bra och mindre bra om esperanto i pressen

Sedan förra pressklippskrönikan, som slutade någonstans i augusti förra året, har mängder av skrivelser om esperanto influtit — mer eller mindre positiva — och här har vi försökt plocka fram några.

*Sydsvenska Dagbladet Snällpostens* bilaga hade den 2 september 1978 besökt Elly och Olle Persson i Trelleborg, som en gång för 24 år sedan själva träffats på kongress i Haarlem i Holland och nu berättade om årets kongressbesök under rubriken «*Esperanto ger vänner överallt*».

*Vimmerby Tidning och Kindaposten* förtäljer Henrik Karlsson i Kisa den 9 och 16 september förra året om sina intryck

rat både för esperanto och för sin katolska kyrka, och om detta vittnar åtskilliga pressklipp, såsom t ex ur *Skövde Nyheter* den 1 november 1978, *Göteborgs-Posten* och *Falköpings-Tidning* senare i samma månad samt *Smålands Folkblad* den 10 april 1979.

## HUNDRAÅRSJUBILEUM I FÖRSKOTT

Ett stort antal svenska tidningar har tagit sig före att citera ett engelskt pressmeddelande som går ut på, att esperanto i december 1978 kunde fira «hundra år av misslyckande». Förutom att årtalet är fel — rätt-

nighet. Esperanto fungerar ju alldeles förträffligt, där det tillåts att fungera — och det är minsann inget misslyckande!

*Nyheter från Sovjetunionen* har i sitt septemhernummer 1978 en helsides intervju med den estniska språkforskaren Paul Ariste, gjord av Alexander Charkovskij och betitlad «*Kan esperanto bli världsspråk?*».

Svenska FN-förbundets tidskrift *Världshorisont* har i sitt nr 5-6/1978 (utkommet i mars 1979) på en hel sida slagit upp en översättning från *Revuo Esperanto* om FN:s bekymmer med tolkningskostnader, men här om har ju *La Espero* redan rapporterat i ett tidigare nummer.

I *Arbetaren* den 12 januari finns en liten insändardikt av Ingegerd Tengelin, som slutar så här: «... Mannens livsverk blev ett konstgjort språk som han kallade esperanto. Esperanto betyder hopp. Esperantolandet är Jorden. Han var ögonläkare».

Einar Dahl blev vid sitt från-

rantoförbundet. Vem har dem?]

*Östra Småland* låter den 17 januari John Wik, *Jönköpings-Posten* den 10 februari Karl Burremo och *Västgöta-Demokraten* den 21 febr Elis Johansson och Victor Ekström komma till tals på ett stort utrymme med aktuell information om esperanto — allt illustrerat med brett uppslaget bildmaterial.

Den 18 mars berättar *Skånska Dagbladet* om Henry Ysner från Malmö, som nyligen skrivit en världsflorea på esperanto, med 3 000 arter.

På ledarsidorna förekommer esperanto dessvärre inte så ofta, allra minst i de stora drakarna, men *Svenska Dagbladets* «*Signaturen*» skriver i alla fall den 19 april i sitt «*varjehanda*» i ett underavsnitt rubricerat «*De fyra igen*» (kanske en smula ironiskt) om esperanto i Kina med citat ur *revuo Esperanto*. «*Fyra personer kan onekligen ställa till*» lyder den något syrliga slutsatsen.

Radio och TV är sparsamma



från besök i Bulgarien i samband med världskongressen i Varna i somras. Han hade också verkligen intressanta erfarenheter att berätta.

Nils Johansson är klubbordförande i Norrköping, och om honom har *Norrköpings Tidningar* artiklar både den 6 och 15 september 1978 i anslutning till en utställning med devisen «*Lär dig esperanto i dag — du behöver det i morgon*».

Runo Stridell är en annan östgöte med flitig penna, när det gäller att argumentera om språkfrågor i allmänhet och för esperanto i synnerhet. «*Om fria språkvalet*» är t ex rubriken på en av hans insändare i *Östgöta-Correspondenten* den 5 oktober där det påvisas hur anglo-amerikanska ekonomiska och politiska intressen stundom helt ohöjlt redovisas, då man på det hållet strävar att bevara och stärka hegemonin över den övriga världen via sitt språk.

Albino Ciccanti är en numera välkänd franciskanermunk från Rimini i Italien, som avlagt många besök i vårt lands sydliga och västliga delar. Därvid har han framgångsrikt missione-

ligen blir det ju sekeljubileum först år 1987 — så är det rätt anspråkslösa kriterier man ställer på ett «misslyckande», omma pressorgan skriver t ex: «*I det stora hela har försöket att skapa ett världsspråk misslyckats*».

Det här med «misslyckat världsspråk» går f o igen i så många tidningar, att man faktiskt kan undra, om det rör sig om en organiserad och nedrig kampanj. I så fall är det ju fasiligt, så lätt det varit att få denna totalt missvisande notis införd, medan det eljest visar sig svårt att få in aldrig så sanningsenliga och mera positiva nyheter om esperanto — ibland även sådana av stort format.

Visst är det en källa till besvikelse för många aktiva esperantister, att språket inte snabbare nått den plats i solen som det faktiskt vore värt — både tack vare sina förtjänster som språk och med tanke på den katolska situation, som språkförbistring och språkligt förtryck och diskriminering lett till i vår värld. Men nog är alla och envar inom esperantorörelsen ense om, att talet om «ett misslyckat försök» enbart vittnar om okun-

fälle i januari föremål för minnesrunor i flera tidningar landet runt, och några av dessa har kommit i våra händer: *Svenska Dagbladet*, *Bohuslänningen* och *Söderhamns-Hälsinge-Kuriren*. En annan gammal esperantist, som varit med länge, f. tobakshandlaren Albert Liljemark i Gävle, uppmärksammas i Gävleborgsområdet vid sitt fränfälle på sin egen 83-årsdag i februari.

Några tidningar, t ex *Halands-Posten* den 6 febr och *Uppsala Nya Tidning* den 21 mars, innehåller en stort uppslagen artikel, signerad Eva Backelin, under titeln «*Esperanto — ett språk på frammarsch*», i *Halands-Posten* dessutom påspätt med andra samtida artiklar om esperanto, där Halmstadsklubbens ordförande Gunnar Tengling intervjuas.

[Red. anm.: Eva Backelins artikel var ett slags svar på alla notiser om «det misslyckade språket», utskickad av Svenska Nyhetsbyrån. Den blev publicerad i en rad andra tidningar än de nämnda, t ex *Norrköpings Tidningar*, *Barometern(?)* m fl, men inga klipp har nått Espe-

med esperanto, men i TV 2:s *Igelkotten* den 15 okt 1978 (med repris tre dagar senare) förekom ett inslag i form av en film om bröderna Wikström i Märsviken i Medelpad. Den ene av dessa, 88-åriga Olof Wikström, berättade att han lärt sig esperanto som ung, och berättelsen illustrerades med en «stenkaka» med sång på det internationella språket.

I samband med *Semajno de internacia amikeco* i februari 1979 hade radions P 1-program *Vardags* en intervju med SEFs ordförande Roland Lindblom.

Bland alla tidningsklipp har vi också fått ett från Finland. Det är den svenskspråkiga *Åbo Underrättelser*, som i sin Helgläsning den 17 mars låtit signaturen Ullis Golowan intervjua lektor Irja Klemola under rubriken «*Hon tror på esperanto!*»

Av utrymmesskäl går det inte ens att räkna upp alla tidningar som intresserat sig för esperanto, men en bland dem, *Skövde Nyheter*, är värd ett särskilt erkännande för sina många påpassliga artiklar och notiser.

Karl Gustafsson

## Agado esence simila al la antaŭaj jaroj

«Ni esperantistoj, kiuj praktike spertis la utilon de esperanto en internaciaj kontaktoj, sentas entuziasmon por nia lingvo. Pro tiu ĉi sperto ni volonte reklamas kaj propagandas por esperanto kiel la solvo de la monda lingvo-problemo.

Tamen esperanto ne vendiĝas per si mem — tion ni ankaŭ spertis dum la jaroj pasintaj. Estas nekaŝebla fakto, ke la sveda esperantistaro ne kreskas membronombre. Ĉu tio dependas de eksteraj kontraŭaj fortoj aŭ de malbonaj labormetodoj? La estraro multe diskutis pri novaj labormetodoj dum la pasinta agadjaro kaj estas preta komenci diskutadon kun niaj membroj jam en Kungälv pentekoste.

La pasinta agadjaro esence similis al la antaŭaj en grado de vigleco. Urĝas trovi pli efikajn labormetodojn kaj la ĝustajn argumentojn.

Zamenhof estis sola, kiam li komencis argumenti por nia lingvo. Kompare kun tio ni estas multaj kaj nun necesas progresi.»

Per la jenaj *Finvortoj* la estraro de SEF resumas la agadjaron de la asocio dum la pasinta jaro. Kiel menciite, la agadjaro similis altgrade la antaŭajn, do la ĉefa agado estis ĉe la kluboj. Tion ankaŭ konfirmas la du paĝoj aldonitaj al la jarraporto, kiuj koncize mencias la ĉefan agadon de la unuopaj grupoj.

SEF registris ioman mal-kreskon en la nombro de membroj, sed ĝi estis atendita pro la pli frua decido altigi la kotizojn de 30 ĝis 50 kronoj po jaro. Por kelkaj (ne multaj) tiu altigo sentigis evidente iom troa, kaj ili forlasis la organizon. La plej granda parto tamen restis kaj — kontraŭe — bone kontribuis al la plibonigo de la financoj, ne malplej per aliĝo al *Klubo Cent*, kiu povis dum 1978 registri preskaŭ cent membrojn kaj kiu povis helpi financi la eldonon de la nova informilo *Esperanto idag* kaj de la samnoma ekspozicia afiŝaro.

Inter la diversaj raportitaj eroj elstaras la seminario por kursgvidantoj, aranĝita en Jönköping en la aŭtuno. *La Espero* jam raportis pri ĝi.

Sed ni foliumu tra la jarraporton laŭ ordo.

La ekonomio montras kon-

tentigan rezulton por 1978 kun pluso je ĉ. 8000 kronoj. Tio ŝuldiĝas al *Klubo Cent*, sed ankaŭ al la ŝtata monsubvencio por *La Espero* (preskaŭ 6000 kronoj).

La oficejo de SEF estas malfermita ĉiun mardan vesperon per volontula servo. Por pli grandaj ekspedolaboroj oni utiligis la sabatojn.

La jarkongreso okazis en Uppsala kaj elstaris pro vigla podia diskuto, kiun partoprenis



la universitata rektoro Torgny Segerstedt, profesoro Harald Riesenfeld, ĉefbibliotekisto Gert Hornvall, parlamentano Arne Gadd kaj docento Ebbe Vilborg.

SEF eldonas *La Esperon*, kiu aperas per ok numeroj po jaro en eldonkvanto de 2000 ekzempleroj, *Esperantonytt*, kiu aperas per kvar numeroj en 6000 ekzempleroj kaj *klubbinfo*, kvar foje jare en ĉ. 100 ekzempleroj.

La regulan informadon plenumas *Esperantonytt*, sendata i a al ĉiuj parlamentanoj kaj bibliotekoj, dum specialaj eldonaĵoj estas uzataj por diversaj informkampanjoj.

La pasintjara aŭtuna «informa novaĵo» estis ekspozicia afiŝaro en formato 70x100 cm, presita dukolore en silkopreso.

Multo de la kluba laboro konsistas el studlaboro. Plej multaj kluboj aranĝas studrondojn, precipe kursojn por komencantoj. Gojiga fakto estas, ke laŭ la ensenditaj raportoj multe pli da gejunuloj partoprenas la kursojn, preskaŭ duoble kompare kun la antaŭa jaro.

## Dekunu proponoj por vigligi la agadon

Viglecon de organizo montras ne nur raporto pri laboro farita, sed ankaŭ proponoj pri laboro farota. En SEF tiu ebleco ekzistas ĉiam, ĉar ĉiu ajn, unuopulo kaj klubo povas kiam ajn iniciati ion aŭ proponi al la estraro ion. Sed eblas ankaŭ fari proponojn al la jarkunveno.

La kajero *Proponoj al la jarkongreso* enhavas ĉijare dek unu proponojn, pli ol iam dum la lastaj jaroj. Ni kune trafolumu tiun kajeron.

te laboras per eksterlandaj gastoj kaj prelegserioj, opinias, ke tiu agado estas grava kaj ke la estraro devus dediĉi grandan atenton al ĝi. La samon opinias ankaŭ la estraro, kiu subtenas la proponon de L. Åberg.

Åke Rohdin proponas, ke la poŝta administracio estu kontaktita rilate al eldono de oficiala poŝtmarko por la kongreso 1980 en Stokholmo. Tiun proponon la estraro subtenas. Å. Rohdin ankaŭ levas la demandon pri 1987, kiu fariĝu *Internacia lingvo-jaro*. La estraro opinias, ke tiu ideo estas subteninda kaj proponas pludoni ĝin al UEA, kiu laboru tiucele en UN.

La klubo de Jönköping reprezentas sian pasintjaran proponon pri vojaĝsekretario, en iom modifita formo. La vojaĝsekretario(j) laboru distrikte kaj havu la taskon ĉefe aktivigi la klubojn en sia distrikto per diversaj agadoj. Tion la estraro de SEF subtenas, sed opinias, ke tio estas tasko de la klubaj distriktoj aŭ de «kunlaborantaj kluboj», kiel ĝi esprimas sin.

La sama klubo proponas ankaŭ ellaboron de taŭga informilo pri esperanto, kiu turnu sin al senlaboraj gejunuloj. La estraro opinias, ke taŭgaj informiloj jam ekzistas kaj pludonas la ideon al la kluboj por realigo.

Ankaŭ el Jönköping venas la propono pri eldono de adresaro pri la membroj de SEF. La estraro samopinias pri la utilo de adresaro, sed proponas malakcepton de la propono pro ekonomiaj kaŭzoj.

Du pliajn proponojn faris la klubo de Jönköping: unu pri aktivigo de la kluboj antaŭ la UK 80 kaj unu pri plia aranĝado de kursoj por kursgvidantoj. Pri la unua la estraro diras, ke estas grave, ke la kluboj uzu la informojn pri la kongreso, kiujn publikigos *La Espero* en sia agado; pri la dua, ke oni daŭrigu la kursojn, se ankaŭ la dua kurso en la proverbio montriĝos same sukcesa kiel la unua, kiu okazis en Jönköping.

Fine venis propono el la klubo de Örebro, kiu proponas, ke oni provu aranĝi ion pri esperanto sur la laktopakajoj, ĉu kelkajn informojn, ĉu rapidan kurson. La estraro akceptas la ideon kaj pretas labori por ĝia realigo.

Lennart Åberg, kiu mul-





Anmälningsblankett (bindande)

Jag anmäler mig till kursen i Karlskoga den 28 - 30 september 1979.

Jag har markerat med ett kryss för det alternativ jag föredrar i kursuppläggnig.

Jag tycker kursen helt bör inriktas på undervisningsmetodik och vuxenpedagogik

Jag tycker att kursen även bör innehålla undervisning i Esperanto enligt fördelningen

- metodik 75% - esperanto 25%
- metodik 50% - esperanto 50%

Jag har tidigare lett esperantokurser i form av

- nybörjarcirkel
- fortsättningscirkel
- annan undervisningsform (t ex i skola)

Beskriv!.....  
.....  
.....  
.....

Namn:.....

Bostadsadress:.....

Postadress:.....

Telefon: ...../.....